Nürnbergo, la 25. de Majo 1958.

Kara kaj tre estimata Sro [illegible]!

Vian respondon de la 18. de Majo kaj la du kopiojn mi tralegis kaj pripensis.
Mi dankas al Vi por Via peno kaj por la peno de Via estimata edzino en la nomo de la eklezi-liberaj esperantistoj kaj en la nomo de la eklezi liberuloj.
Precipe mi tre ĝojas, ĉar Vi parolos dimanĉe la 3. de Aŭgusto en la liber-religia edifejo pri Müller Lyer, kiu estis unu el la malmultaj scienculoj, kiuj komprenis la valoron kaj la signifon de Esperanto.
Müller Lyer estas konata ĉe preskaŭ ĉiuj funkciuloj de la tuta emancipacia movado, kiu rompis la ĉenojn de la mezepoka absolutismo.
Via opinio estas ĝusta:
ni devas atingi, ke nia solenaĵo trovos lokon en la Kongres Libro kaj
ni devas fondi Invit=Komitaton.
Mi akceptas la taskon, estri la komitaton kaj konsentas Vian proponon por komitat=ano
Samr Sro Jean Karey Wiesbaden Kostheim
Schiersteiner Str. 3.

Mi proponas kiel plua komitat=anon
Samr Sro Konrad Lentner München Agnes Str. 5.
Li estas komitatano de la Universala Esperanto Asocio kaj li persone konas min.

709.752-C. Esp. M. 7

I.

Österreichische Nationalbibliothek Digitale Services

Mi antaŭ skribis al ~~Samo~~ ~~Sro~~ Sro Otto Thimme
Gross-Gerau Gabelsberger Str. Li ne konas min
sed ĉar li estas edukiato, mi supozas, ke li
akceptas.
Mi petas ilin, kontakti kun nia asocia sekretario
~~Samo~~ Albert Hener Hannover
En Via letero de la 13. de Majo mi povas legi:
Poste Sro Hener respondis, ke mi kiel esperantista
funkciulo estas rajtigita transpreni la
solenaĵon.
Mi respektas ĉi tian rajtigon kaj mi respektas
Viajn decidojn.
Antaŭ Via respondo de la 18. de Majo kaj
antaŭ la respondo de Sro Hener de la 7. de Majo
mi petis la sekretarion de la Brita Esperantisto
Humanitaro nian ~~Samon~~ ~~Sron~~ George L.
Dickinson 21 Gribble Road Liverpool 10
publigi en la Revuo „The British Esperantist"
informon pri nia solenaĵo en Mainz.
Mi petas pardonon, se la situacio intertempe
aliiĝis, kaj mi esperas, la kongresanoj kiuj
vizitos la solenaĵon ne plendos pro tia
situacia aliiĝo.
Estas ja nur signo de la progreso.
Mi aldonas kopion por Via informo pri
letero, kiun mi skribis al la Centra Oficejo
Mi nun havas la konsenton por la solenaĵo
en Mainz

II.

de la sekretario de la Germana Popolasocio por Spirit-Libereco de la 21. de Febr.

de la sekretario de „International Humaniat And Ethical Union"
Utrecht-Holland 152 Oudegracht de la 18. de Marto
de Sro. Dro Georg Pick de la 24. de Marto
de la sekretario de la Germana Liberpersona Esperantista Asocio
Sano Sro Eduard Weichman Dortmund Kirchdorne Loten kamp 4 de la 11. de Aprilo
kaj Vian konsenton de la 18. de Majo.

Nun mi povas skribi al la Konstanta Kongres Sekretario;
rilate de la letero de Sano Sro i nternista
Ernst Bepperling Wetzlar Grosse Promenade 2a
al la Konstanta Kongres Sekretario
Sro Gian Carlo Fighiera
ni formigis Invit-Komitaton de la Universala Esperanto Humanistaro kaj
ni ne petas, sed ni atendas la mencion de nia liberreligia solenajo en la Kongres Libro
En la Esperanto Revuo Internacia Majo 1958
paĝo 79 Vi tre šatata Sano Sro G. C. Fighiera deklaras: la Universala Kongreso ne apartenas
al unu lando aŭ
al unu popolo.
La Universala Kongreso ne apartenas nur al la dogmaj fidelaj religiaj societoj sed al
ĉiuj religiaj societoj
ankaŭ al la dogmaj liberaj religiaj societoj
ankaŭ al la Humanistoj.

III.

Via kondato rifuzi al ni la rajton partopreni
al la Kongreso ne estas nuniga agado
en sinforgeso,
sed nia partopreno estas eblevigo al la
kompletigo de la kongres sukceso

Mi aldonas por Vi kopion de la respondo
de nia ~~Sno Sro~~ G. L. Dickinson,
sed ĝis nun mi ne ricevis respondon
de la Centra Oficejo.
Mia espero ricevi respondon ne estas
forta.
La Prezidanto de Universala Esperanto Asocio
Profesoro Dro Lamoto estas pura
sciencanto, sed li loĝas en la sama lando
kie suferis Vesalius kaj mi persone
konas lin kaj la celkoncepton laŭ kiu
li pensas.
Mi scias certe, ke miaj komitatanoj
donas al mi la necesan kompletigon
kaj la sukceso kaj la progreso estas
je nia flanko.
Se mi riceras plu ajn respondojn,
mi informas Vin.

Sincere
Via
Ernst Gemeinhardt

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK
704.752-C
ESP. M. 7

IV